

Friedrich Schiller,  
Al la ĝojo

*tradukita de Manfredo Ra-  
tislavo*

Ĝojo, bela sparko dia,  
de l' ĉielo vi filin',  
ĝoje staras ni en via  
templo kaj adoras vin.  
Sorĉe ĉio religigās,  
kio apartigis sin,  
ĉiuj homoj gefratiĝas,  
kie vi restigas vin.

Ĥoro:

Estu chirkaŭbrakumitaj,  
lasu kisi vin, homar' !  
Estu unu amikar'  
ĉiuj homoj disigitaj!<sup>2</sup>

Se vi faris grandan ĵeton  
kaj amikon gajnis vi,  
aŭ akiris virineton,  
kunjubilu vi kun ni !  
Ja – se vin nur amas iu  
en la bela, vasta mond'!  
Kiu restas sola, tiu  
plore iru el la rond'!

Ĥoro:

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

...

Friedrich Schiller,  
Al la ĝojo

*tradukita de Joachim Gießner*

Ĝojo! Vi fajrero dia,  
d'Elize' filino vi!  
En sanktej' benita via  
arde vin omaĝas ni.  
Sorĉe ligas vi beate,  
se disigis malraci'.  
Hom' al hom' estiĝas frate,  
kie milde regas vi.

.....

.....

.....

.....

.....

Kiu de amik' fidela  
nomas sin amik' de li,  
kiu kun edzin' anĝela  
vivas, jubladu pli,  
eĉ, se nur al unu koro  
ie ligas lin inklin'.  
Sed aliaj ja kun ploro  
el la lig' forŝtelu sin.

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

.....

...

Friedrich Schiller,  
Al la ĝojo

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Ĝoj'! Fajrero belradia!  
Elizea di-filin'!  
fajrebrie ni al via  
templo iras, preĝi vin.  
Ĉesu, de vi sorĉligate  
de l' rigora mod' la ŝir',  
ĉiuj homoj sentas frate,  
se vi ŝirmas per flugil'.

Ĥoro:

Jen brakumoj al milmiloj,  
Jen ĉi kis' al tuta mond'!  
Fratoj! super stela rond'  
loĝas patro por ni, filoj!

Se la granda ĵet' bontrafis  
kaj amikon gajnis vi,  
se virina am' vin ravis:  
Vin enmiksi kun ĝojkri'!  
Jes, se eĉ nur unu koro  
estas via en la mond'!  
Kaj se ne – do vin kun ploro  
ŝtelu for el nia mond'.

Ĥoro:

Ĉiu sub ĉielo glata  
donu sin al simpati',  
al la steloj gvidas ĝi,  
kie tronas Nekonata.

Ĉiu sur la brust' Natura  
suĉas sukton de la ĝoj'  
kor' malbona, koro pura  
sekvas ŝin laŭ roza voj'.  
Ŝi vinberojn, kisojn donas  
kaj amikon sen pridub',  
en volupt' la vermo dronas,  
vidas Dion la kerub'.

...

<sup>2</sup>Tiu verso ne tute redonas la enhavon de la koresponda origina strofo.

Ĥoro:	.....	Ĥoro:
.....	.....	Ĉu genuas vi, milmiloj?
.....	.....	Vi kreinton sentas, mond'?
.....	.....	Serĉu super stela rond',
.....	.....	loĝas Li trans astro-briloj!
.....	Ĝojo estas la risorto	En eterno de l' Naturo
.....	en eterna la natur'.	Ĝojo estas la risort'.
.....	Ĝojo jen per sia forto	En la mondhorloĝ' por kuro
.....	movas l'universon nur.	radojn pelas ŝia fort'.
.....	Florojn el burĝonoj logas,	Ŝi el ĝerموj logas berojn,
.....	sunojn, astrojn puŝas ĝi.	sunojn regas ŝia gvid'
.....	Sferojn forajn ĝi apogas	Ŝi tra l' spaco rulas sferojn
.....	en senfina galaksi'.	trans la astronoma vid'.
Ĥoro:	.....	Ĥoro:
.....	.....	Kiel sur la pompaj vojoj
.....	.....	sunoj sur la firmament',
.....	.....	gaje marŝu, frata gent',
.....	.....	kiel venki la herooj!
.....	.....	Esploriston ŝi alridas
.....	.....	el la fajrspegul' de l' Ver',
.....	.....	sur krutaj' de l' Virto gvidas
.....	.....	ŝi la homon de toler',
.....	.....	sur Kred-Monto sunobrila
.....	.....	flirtas ŝia flag' el or',
.....	.....	ŝin tra l' fendo ĉerk-kovrila
.....	.....	vidas ni en anĝel-hor'.
Ĥoro:	.....	Ĥoro:
.....	.....	Ho toleron, paciencon,
.....	.....	fratoj, por pli bona mond'!
.....	.....	Donos super stela rond'
.....	.....	granda Dio rekompencan!
.....	.....	Ĉu pripagi diojn? Vanto!
.....	.....	Ĉu simili? Bela pen'!
.....	.....	Venu ĝoji kun ĝojanto
.....	.....	la mizero, la ĉagren'.
.....	.....	Veng' ? Koler ? En forgeson!
.....	.....	Jen pardon' al malamik'!
.....	.....	Liaj larmoj havu ĉeson,
.....	.....	lin ne boru pento-pik'.
...	...	...

Ĥoro: .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro: .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

.....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro: .....  
 .....  
 .....  
 .....  
 .....

Ĥoro:  
 En ŝuldlibroj plu nenio!  
 Mondon regu harmoni'!  
 Fratoj! Kiel juĝis vi,  
 tiel juĝos pri vi Dio!

Ĥojo ŝaŭmas en pokaloj,  
 en orsango de l' vinber',  
 mildon trinkas kanibaloj,  
 heroecon malesper'.  
 Se rondiras la botelo,  
 fratoj, saltu el la sid',  
 ŝprucu ŝaŭmo al ĉielo:  
 Jen ĉi glas', por Bon-Spirit'!

Ĥoro:  
 Himnas Lin abismo stela,  
 serafar' kun glora cit'.  
 Jen ĉi glas' por Bon-Spirit',  
 supre, trans la tend' ĉiela!

En suferoj: firma forto,  
 al senhelpaj: ŝirma brust',  
 eternec' al ĵura vorto,  
 eĉ al malamiko: just'.  
 Virfiero kontraŭ tronoj,  
 kvankam sangon kostu spit',  
 al merito estu kronoj,  
 kaj perejo al insid'!

Ĥoro:  
 Fermu vin en sankta rondo,  
 Ĵuru do kun glaso-lev',  
 pri l' fidelo al la Dev',  
 je l' Reganto de l' Stel-Mondo!

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 1982.*

Arg-133-264 (2004-01-16  
 21:22:19)

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-133-889  
 19:35:47)

*Traduko de la Germana poemo "An die Freude" de FRIEDRICH SCHILLER (Frederiko Ŝilero, \*1759 – †1805) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976) en 1958.*

Arg-133-263 (2004-01-16 21:13:09)